**ILEI raportas**

Raportas la Prezidanto kaj la Estraro de ILEI pri trimonata agado, de 2023-01-15 ĝis 2023-04-15.

**Eventoj**

**Evoluigo de la laborplano de ILEI – laborplano por la Movado**

Post longaj kunpensadoj kaj diskutoj unue inter la estraranoj kaj poste en la Komitato de ILEI, la nova laborplano aprobiĝis dum la 55-a kunsido de la Komitato en la 10-a de decembro 2022. Kiel videblas, la plejmulto de la laborplaneroj estas por antaŭenigado de la tuta Movado.

Ekpost la aprobo, denove multaj retdiskutoj okazis por ektrovi kiel plej efike la enhavo de la Laborplano povas realiĝi. Danke al ĉies helpoj kaj konsiloj, pleje flanke de proesoro Renato Corsetti, jam pretas kadro por efika traktado de ĉiuj eroj de la Laborplano.

Por pli efika aliro al la plenumado de la ambicia 38-era Laborplano, ĝi estas rearanĝita en 6 grupojn. Ĉiu grupo de la laborplaneroj estas iel similaj, laŭaj kaj/aŭ kompletigaj unu al la aliaj. Ekzemple, atento-fokuso de la Grupo 5 estas instruado, la ĉefa tasko kaj misio de ILEI – kiu fakte temas pri la bazo de nia tuta movado kaj ĝiaj pluvivado kaj evoluado.

Por ĉiu grupo de la laborplaneroj okazos ILEI-forumo, en kiu ĉiuj, kiuj jam helpas aŭ deziras kontribui, povos partopreni kaj diri pri siaj ideoj, proponoj kaj agoj. Estis decidita, ke Forumoj pri la Laborplano 2023-2024 okazos ĉiun duan vendredon de ĉiu monato. ***ILEI bonvenigas ĉiujn partopreni kaj kontribui!***

Jam estas ricevitaj helpaj proponoj, ekzemple Stano Marĉek donacis bitajn versiojn de sia fama lernolibro, *"Esperanto per Rekta Metodo"*, al la projekto Esperanto-kursaro Tibor Sekelj (EToSo), kadre de kiu eblas en la pagita Zoom-konto de IrEA, ekinstrui Esperanton – kaj grave! ties registraĵoj (laŭ la aŭtora elekto) eblas alŝuti en la jutuban kanalon de ILEI por ĉiama kaj ĉiesa utiligo.

Sekve de antaŭaj kunsido kaj konsentoj pri tri-lateraj kunlaboroj de UEA, TEJO kaj ILEI, jam okazas novaj planoj, i.a. pri kunkongresoj en 2023 kaj 2024. Por la realigado de la laborplaneroj de ILEI, ĉiuj funkciuloj kaj membroj de UEA kaj TEJO estas invitataj por fruktodona kunlaborado.

**ILEI-forumoj**

2023.04.14 estas anoncita kaj okazigita la unua Forumo de ILEI pri la aprobita Laborplano. Temis pri la punktoj de la Grupo 5 de la Laborplano, kiu rilatas esence al informado al la ekstera publiko kaj instruado de Esperanto. Partoprenis entute 13 personoj el almenaŭ 10 landoj (inter ili Irano, Italio, Francio, Serbio, Hungario, Rusio, Portugalio, Hispanio, Armenio). Oni diskutis pri jenaj taskoj:

- "Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo": plenumigi almenaŭ 10 realigojn de la leciono por neesperantista klaso (niaj membroj);
- "Esperanto-kursaro Tibor Sekelj rete": starigi kursojn en almenaŭ 5 landoj/lingvoj, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo (Ahmad kaj Renato);
- Instruado en publikaj lernejoj: realigi la iniciaton "30 Oraj Horoj" en Italio kaj bone dokumenti ĝin per libro, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi imitadon (Laura, Bruĉjo, Alessandra);

- Instruado en publikaj lernejoj: realigi iniciatojn similajn al la "30 Oraj Horoj" en almenaŭ tri landoj krom Italujo (niaj membroj);
- Prezenti Esperanton al almenaŭ 3 NROj, precipe pri paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj (Ahmad, Max Garcia, Didier Janot);
- Batali kontraŭ analfabeteco per instruado de Esperanto almenaŭ en unu lando (Ahmad);
- Sendado de lernolibroj al Afriko (Renato, Karine).

**La situacio de la Banko de ILEI**

La Estraro ĝoje informas, ke finfine solviĝis la problemo kun kodo por konto de ILEI – danke al insistaj klopodoj de la kasistino Karine Arakeljan. Nun ĉio bone funkcias kaj tio multe plifaciligos la agadon.

**Renovigo de la retejo de ILEI**

Daŭras la renovigado de la retejo de ILEI. En la retejo https://www.ilei.info/agado/projektoj.php kaj en la rubriko "Novaĵoj" konstante estas aktualigata informo pri okazantaj kja okazontaj Esperanto-kursoj. Alessandra Madella rekreis novajn formularjon por membriĝo kaj abonoj, en kiuj estas denove inkluzivita la ebleco pagi per la banko-konto de ILEI. La ĉefprizorganto Jozefo Nemeth diligente kaj senrompe dislokas ĉiujn gravajn kaj freŝajn informojn.

**La Estraro**

Regule okazas retaj kunsidoj de la Estraro, kie ĝi traktas kaj solvas kurantajn taskojn.

**Sekcioj**

La Estraro denove rememorigas pri la 30-a de marto kiel limdato por sendi jarraportojn. Marija Jerković, la estrarano pri landa agado, dissendis alvokojn al ĉiuj sekcioj, reprezentantoj kaj kontaktpersonoj. Ŝi ricevis jam multajn. Tamen ILEI, bedaŭrinde, perdis sekciojn en Izraelo, Grekio, Uzbekio kaj Slovenio. Gojige aperis nova sekcio en Ganao, Marija ricevis jam la liston kun membroj kaj sendis ĝin al la membroadministranto Hamzeh.

**Kapabligo**

Laŭ la Estrara decido ILEI disponigis por instruado de Esperanto en Togolando 750 eŭrojn el la Fonduso Afriko. La kursgvidanto estas Adjé Adjévi, kiu prezentis sian subvencipeton al la Estraro . Temas pri agado por la Progresigo de Esperanto en Togolando (APETO). Ĝi komenciĝis antaŭ iom da tempo ĉe vatsapo *https://chat.whatsapp.com/FvJwQzrtR8uL3AMz5p3GdS* kaj daŭros pere de la ĉeesta sesio. La uzataj lingvoj dum la instruado estas: la evea, franca kaj Esperanto. En la grupo estas 20 kursanoj, sed "veraj" komencantoj estas 16 homoj. Al ĉi tiuj (lokaj gekomencantoj plus unu el Benino - plejparte kun universitata eduknivelo) estas planata 5-taga ĉeesta kurso en ferio de aprilo 2023, por pli vive lertigi ilin pri la lingvo kaj la movado. La uzata kursmaterialo estas: Metodo 11 kaj ekzercoj el la retpaĝo Edukado.net.

Daŭras kunlaboro de ILEI kun Afriko kaj la kampanjo, komencita de Renato Corsetti por kolekti monon por sendi lernolibrojn tien. La unua parto de lernolibroj alvenis al Zimbabvo. ***ILEI kore dankas niajn francajn samideanojn pro ilia helpo!*** ILEI invitas ĉiujn, kiuj ŝatas subteni la instruadon en tiu kontinento pere de la konto ilek-a ĉe UEA aŭ rekte al la

banka konto ING BANK N.V. IBAN: NL55INGB0004676855 BIC: INGBNL2A kun indiko "por ILEI/lernolibroj al Afriko".

## Projektoj

### La kursaro Tibor Sekelj (EToSo)

Daŭras la instruado de Esperanto enkadre de reta kursaro Tibor Sekelj (EToSo). Jam okazis diversnivelaj kursoj (konsiderante la laborlingvojn) por Vjetnamio, Indonezio, Rusio, ankaŭ por la Tutmondo kaj pere de Esperanto. Estas planata kurso por Ĉinio. ***ILEI invitas ĉiujn okazigi kursojn helpe de la senpaga teknika helpo de IrEA!***

### Interŝanĝoj de lernejanoj

Bone disvolviĝas ankaŭ la projekto pri interŝanĝo de lernejanoj, komencita pasintjare de la franca instruisto Emmanuel Desbrieres. Survojas nun video-korespondado inter liaj lernantoj, slovenaj gelernantoj kaj la gestudentoj de la unua jaro de Zaozhuang-Universitato subgvide de Alessandra Madella. Ĉiujn videojn pri la projekto spekteblas en la jutuba kanalo de ILEI.

La gestudentoj de Zaozhuang-Universitato ankaŭ komencis skriban korespondadon en la ĉina kaj Esperanto kun la lernantinoj de la itala instruisto Carlo Nicola Colacino.

### Homa Ĉeno

La venonta epizodo de la Homa Ĉeno, pli longa ol la aliaj, aperos antaŭ la fino de aprilo, zorge de Max Garcia kaj Alessandra Madella, kiuj estas pretigantaj ankaŭ novan MAGA-filmon, espereble por la Kongreso en Linjano.

### Regiona agado

Radojica Petroviĉ reprezentas ILEI en Eŭropa Komisiono de UEA kaj sekvas la evoluon en Serbio kaj najbaraj balkanaj landoj. Kunlabore kun Renato Corsetti (kunordiganto de la Eŭropa Komisiono) kaj Aurora Bute (UEA-estrarano pri eŭropa agado kaj rilatoj kun ILEI), kun teknika helpo de Gradimir Kragiĉ (Bosnio-Hercegovino), estis okazigitaj du kunvenoj (pluaj estas planataj ĉiumonate) de esperantistoj el Danubio kaj Balkanio por diskuti E-instruadon kaj komunajn E-projektojn en tiiu regiono. La kunvenojn gvidis R. Corseti kaj partoprenis reprezentantoj, ĉefe ILEI-anoj sed ne nur, de Rumanio, Serbio, Kroatio, Bosnio-Hercegovino, Hungario, Ukrainio, Bulgario, Grekio kaj Albanio. Oni ĉefe diskutis pri aktualaj E-kursoj en Serbio, Rumanio kaj Kroatio, kaj pri eblaj komunaj eventoj kaj edukprojektoj. Sekve, oni notas komencojn de revekiĝo de la movado en Bosnio-Hercegovino kaj en Grekio, kaj kelkajn novajn iniciatojn en aliaj landoj.

Kelkaj E-organizoj kaj ŝtataj lernejoj en Kroatio kaj Serbio partoprenas en tri projektproponoj/subvencipetoj al Erasmus+, kies rezulton (ĉu aprobitaj aŭ ne) oni atendas en la unua duono de la jaro. Aurora Bute proponis komunan agadon "Balkana Itinero" por pli bona interkonatiĝo kaj kunlaboriĝo de landaj movadoj kaj por kultura proksimiĝo de la diversaj etnoj kaj landoj de la regiono per Esperanto.

Serbia Esperanto-Ligo (SEL), kun teknika helpo de Ahmad Mamduhi kaj IrEA, ĉiumonate okazigas retkunvenojn de siaj membroj. En la marta kunveno prelegis Ahmad Mamduhi pri la E-agado en iranaj universitatoj kiel modelo de universitata agado aplikebla ankaŭ en ĉi tiu regiono. Jam la Universitato de Banja Luka (Bosnio-Hercegovino) interesiĝas, por la komenco,

pri ebla prelego de Ahmad Mamduhi en Esperanto, interpretota serben, pri persa arkitekturo kaj urboplanado. Pria interkonsento survojas.

En la aprila kunveno de SEL partoprenis ankaŭ rumanaj esperantistoj, kiel la unua paŝo de la "Balkana Itinero". Aranka László prelegis pri la KER-ekzamena sistemo de UEA kaj Edukado.net. Kelkaj aktualaj kursanoj de SEL esprimis la deziron KER-ekzameniĝi. Por ili estos organizitaj preparoj kaj provtestoj laŭ la specimenoj troveblaj ĉe Edukado.net.

La reta kurso pri historo kaj literaturo de Esperanto, kiun Zlatoje Martinov aktuale gvidas en Serbio, estos adaptita kaj proponita al pli vasta kursanaro en la regiono .

**Kongreso-2023**

Jam aliĝis 101  personoj. Ekde nun eblas pagi tra la konto de ILEI (banko laŭ ilek-a ĉe UEA) tio espereble aldonos la partoprenontojn. Daŭras komuna varbado flanke de ILEI kaj TEJO. La estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni preparis plurajn filmetojn sendatajn tra la mondo pere de EpserRadio, Webradio kaj aliaj sociaj retejoj tiucele. Bonvolu, spekti ĉe https://youtu.be/EVvR3bZjwXE LKK kun TEJO decidis pri la koncerta programo. La ekskursa programo estas preskaŭ preta. Krome, nun LKK kun TEJO solvadas la demandojn pri invitleteroj. Ilin kaŭzis tuta ŝanĝo de la reguloj flanke de la Itala ambasadejo.

Alessandra Madella estas fin-pretiganta la programon de la Tago de virina agado kaj la Tago de la Kongresa temo.

Ni rememorigas, ke la plejparto de la kongreso estos hibrida, do eblos ankaŭ aliĝi por reta partopreno.

**Simpozio -2023**

Estas elektita la definitiva temo por la kongreso – "Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj". La respondecula pri tio estrarano Fernando Pita dissendis alvokon por prelegi dum la simpozio tra kelkaj grupoj. Respondoj ankoraŭ ne venis, tamen li sukcesis kontakti kun interesaj homoj, kiuj povas diri ion novan rilate al la simpozia temo. Li daŭrigos plu. La simpozio estos hibrida.

**Trejnseminario por instruistoj dum la kongreso**

Estas traktataj diversaj demandoj rilate al tiu trejnado, kiu okazos parte enkadre de la projekto "Erasmus+. Itala Instituto de Esperanto (IIE) ofertos la seminarion al ILEI kadre  de tiu projekto. La seminario okazos dum la tuta semajno dum 12 horoj sume, temos pri instruado de Esperanto. Ĝin partoprenos la landoj-partneroj de la projekto, krome la trejnado estos malfermita por ankoraŭ 20-25 dezirontaj kongresanoj. Tiucele Radojica Petrović kreis specialan enketilon por la aliĝintoj. Nun LKK atendas la buĝeton de la projekto, difinas la kvanton de la partoprenontoj, kostojn k.a. La projekto ne havas buĝeton por ILEI, tio estas: la projekto kovras la kostojn de la partneraj partoprenantoj kiuj estas 8 kaj por restado de la preleganto.

La Estraro decidis 100%-rabati la aliĝkotizon por instruistoj de lingvaj kursoj de ĉiuj niveloj, kiuj okazos dum la kongreso. Estos rabatitaj parte por ili ankaŭ la loĝkostoj.

**Kongreso-2024**

Daŭras la detala traktado pri la loko de la kongreso-2024. La Estraro esploras pri ebloj okazigi ĝin en Afriko, same kiel estas planata por UK kaj IJK. Estas planata organizi komunan retkunvenon kun la kasisitino Karine Arakeljan, la estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni, la Prezidantoj de UEA – Duncan Charters – kaj TEJO – Albert Stalin Garrido – por pristudi tiun eblecon.

**Eldonado**

Survojas preparado por Aktoj de la Simpozioj. La respondeculo pri tio, Fernando Pita, jam sendis al la brazila eldonejo enhavon de la libro: jam enpaĝigitajn artikolojn por ke ili faru finan diagramadon, kovrilon kaj ISBN-numeron. Estis decidita ĉi-foje, ke la libro havos la ISBN-numeron de la agentejo, ĉar ĝi faras la tutan laboron senpage por ILEI.

Finiĝis la korektado de Esperanta traduko de la verkaro de la itala kuracistino Antonietta Bernardoni pri edukado "La ĉiutaga vivo kiel historio, sen timoj kaj sen psikiatrio" fare de Alessandra Madella, Luigia Oberrauch, redaktita de Ermanno TARRACCHINI kaj la Kolektivo Bernardoni. Ĝi aperos ĉe Edistudio en papera kaj ciferigita eldonoj, por faciligi tradukojn en aliajn lingvojn. Por la publikaĵo la Estraro de ILEI decidis uzi du ISBN-kodojn, inter 99 aĉetitajn de ILEI ĉe la svisa agentejo. Pri tiuj kodoj sekvis esplorado inter Alessandra kaj la agentejo kaj fine ĉiuj formalaĵoj estis faritaj. Nun la nomo ligita al la ISBN-kodoj de ILEI estas la statuta nomo de ILEI en Esperanto ( antaue estis iom malsama versio). Entute ILEI aĉetis 100 ISBN-kodojn. Unu estis uzita por la libro de Nino Vessella kaj estos uzataj por Bernardoni. Nun ILEI havas 97 proprajn ISBN-kodojn por plua eldonado.

Alessandra Madella finverkis la libron pri Esperanto kiel propedeŭtika lingvo kaj finis lastan korektadon, helpe de Laura Brazzabeni. La titolo estas: "L'esperanto: facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue". ("Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la lernado de aliaj lingvoj". Nun la libro estas preta por eldonado fare de Edistudio. Poste Alessandra tradukos ĝin al Esperanto por faciligi tradukojn al alaj lingvoj. Ambau libroj, pri la propedeŭtika valoro de Esperanto kaj pri la penso de Bernardoni, havas antauparolon de la Prezidanto Ahmad Reza Mamduhi.

ILEI ne-finance subtenos la re-eldonadon de la fama lernolibro de Stefan MacGill "Tendaraj Tagoj".

**IPR kaj JA**

La Estraro decidis, ke ekde 2023 ĉiuj abonantoj de paperaj revuoj ricevos ankaŭ elektornikan revuon. La reta versio de la 1-a numero-2023 estis dissendita al 541 retadresoj.

Dum la januara estrarkunsido post la detala analizo de la aktuala stato de funkciantaj sekcioj kaj iliaj estroj kaj financa analizo de la stato de IPR estis decidita, ke kongrue kun la antaŭa decido senpagan paperan revuon ricevos po 1 la estraranoj kaj ĉiuj sekciestroj, kiuj mem pagis por sia membreco en ILEI. La sekciestroj, kiuj membriĝis pere de KhK, ricevos nur retan IPR-n. Krome, ILEI sendas senpagajn revuojn al 9 instancoj: Aŭstra Nacia Biblioteko, Zaozhuang-Universitato, Biblioteko de Massa, Kroata Dokumenta Esperanto-Centro, Japana Esperanto-Instituto, Esperanto-centro Herzberg, Hodler, Flandra Centro "Internacia Esperanto-Arkivo", CDELI. Estis decidite ankaŭ demandi ilin ĉiujn, ĉu ili plu volas ricevi paperan revuon pro eblaj doganaj pagoj.

Jam de kelkaj jaroj la redaktoro de IPR Jozefo Nemeth preparis txt-versiojn de IPR por blindaj esperantistoj. Same okazis por JA, sed ne regule. Nun estas interkonsentite, ke la saman formaton aperos konstante por JA ekde la venonta numero - fare de ĝia redaktoro Stano Marček.

Danke al Aurora Bute ILEI ricevis permeson de UEA kaj E@I disdoni revuojn dum UK en Torino (dum Movada foiro, TdL) kaj dum la IIK al infanoj (JA). Estis decidita pri 400 ekzempleroj.

Brazila Esperanto-Ligo petis de ILEI 350 ekzemplerojn de JA kaj aliaj instrumaterialoj por la Tut-Amerika kongreso de Esperanto (TAKE), kiu okazos novembre-2023, kaj pretas pagi sendokostojn. La Estraro decidis pri 500 ekzempleroj- ankaŭ por la sekvontjara TAKE. Tio ŝparos monon kaj solvos la problemon por Stano Marček, kiu havas jam tro da stoko de antaŭaj numeroj en sia hejmo.

Parto de malnovaj revuoj (200 ekzempleroj) estos disponigotaj ankaŭ por la kongreso en Linjano.

**ILEI en la Reto**

ILEI aĉetis spacon ĉe Google por konservi tie ĉiujn gravaĵojn de sia agado.

**Kunlaboro kun enmovadaj institucioj**

La "Revuo Orienta", la organo de Japana Esperanto-Instituto, publikigis grandan alvokan materialon pri la kongresoj de Torino kaj Linjano. ***ILEI kore dankas la redaktoron, Usui Hiroyuki!***

TEA, Tianjin Esperanto-Asocio, disponigos foto- kaj videomaterialojn pri sia projekto "Teo, Amo kaj la Mondo" por organizi ekspozicion dum la ILEI-kongreso en Linjano kaj en aliaj urboj de Italio.

**Kunlaboro kun ekstermovadaj institucioj**

**FIPLV**

ILEI daŭrigis sian membrecon en FIPLV cele al diversflanka kunlaboro.

**Dankoj**

Ĉiuj personoj, kiuj iom iel kontribuas al la mastrumado kaj vivo de la Ligo, ricevu elkorajn dankojn!

Sekretario de ILEI:

Elena Nadikova

Prezidanto de ILEI:

Ahmad Reza Mamduhi

2023-04-15